

Literaturaj perloj, 3-a parto
Inter ternantoj de Raymond Schwartz
Claude Gacond, 245-a radioprelego, 1968.06.19 & 22

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni ankoraŭ legos unu skeĉon de Raymond Schwartz, kiun ni ŝatus trovi en la lernolibroj pri esperanto. Ne plu temas pri prelego, sed pri humura dialogo.

A.- Tiu skeĉo titolita **Inter ternantoj** dialogigas du amikojn, kiuj renkontiĝas, matene, inter la 10-a kaj 16-a de januaro.

Cl.- « Kia agrabla surprizo ! Ah-ĉumm ! Ah-ĉumm !

A.- Jen, jen ! Estas vi ! Kaj kiel vi fartas ? Ah-ĉumm ! Ah-ĉumm !

Cl.- Nu, duone-duone – foje bone, foje malbone, al...terne ! Ah-ĉumm !

A.- (La dua, kiu ricevis la tutan ŝprucon en la okuloj) :
Alterne, jes, mi vidas, sed ĉu vi ne povus al-terni iun alian?

Cl.- Senkulpigu min ! Tiuj tern-eksplodoj estas subitaj, ne antaŭvideblaj.

A.- Sed kial vi ne posedas terno-metron ?

Cl.- Ĉu ekzistas tia aparato ?

A.- Certe, mia amiko. Oni faris grandajn progresojn en la moderna tern-arto. Aĉetu la Praktikan Terno-Libron kaj vi vidus...

Cl.- Tre interese. Mi lernos terni. Ĉu laŭ la Ĉe-metodo ? Ah-ĉumm !

A.- (La dua, kiu ricevis la ŝprucon en la veŝpoŝo)
Eble ankaŭ laŭ la Ĉe-metodo, sed via metodo ŝajnas esti la Ĉum-metodo !

Cl.- Ne mirige. Tiu abomena vetero estas kulpa pri ĉio.

A.- Ho, ne insultu la veteron. Bonega ĝi estas por ni, pluvombrel-fabrikantoj. Nun ni povas likvidi la stokojn.

Cl.- Evidente, vi estas prava laŭ via... likvid-punkto, sed vi forgesas, ke mi vendas pajloĉapelojn.

A.- El kio rezultas, ke ĉiu vetero, bona aŭ malbona, havas siajn partianojn.

Cl.- Jes, mi estas sun-veter-ano.

A.- Kaj mi, pluv-veter-ano.

Cl.- Do ni konkorde konstatu, ke ni estas ambaŭ veteranoj! Ah-ĉumm!

A.- (La dua, kiu sukcesis protekti sin de la nova ŝpruco nur dank'al sia pluvombrelo)
Konsentite, se vi pluvas ja senpaŭze, kiel bovino, kiu...

Cl.- Ho, amiko, en kiu lernejo vi lernis la gramatikon ? Ĉu oni povas diri « vi pluvas », kiam temas pri verbo ne persona ?

A.- Eble vi estas prava. Sed oni povas diri « mi pluvetas », ĉu ne ?

Cl.- Nek pluvetas, nek pluvegas !

A.- Ĉu vi volas veti, ke oni povas ?

Cl.- Plezure ! Vet' !

A.- Do vi malgajnis, ĉar, vidu, jam hieraŭ mi vetis kaj nun mi... plu vetas!

Literaturaj perloj, 3-a parto
Inter ternantoj de Raymond Schwartz
Claude Gacond, 245-a radioprelego, 1968.06.19 & 22

Cl.- Aĉe, aĉe! Ah-ĉumm!

A.- Dankon, kaj same al vi! Fakte, ja ankaŭ mi ne tre ŝatas tiun ĉi veteron, ĉar malgraŭ ĉiuj pluvombreloj mi tamen nomiĝas Julio...

Cl.- Kaj mi Aŭgusto! Atendante ilin ni povus eble trinki unu grogon.

A.- Aŭ du..., aŭ tri...

Cl.- (Kaj brakon en brako ili foriras, kantante la nacian himnon el Ternujo :)

De l' nazoj riveretoj fluas,
Poŝtukoj svarmas ĉirkaŭ ni,
Ni ankaŭ naztrumpete bruas
En la tutmonda harmoni' !

A.- Tiun skeĉon de Raymond Schwartz, kiu estas titolita **Inter ternantoj**, vi povas relegi en *La Ĝoja podio*.

Cl.- Tiu *Ĝoja podio*, kiel ĉiuj verkoj de nia pariza humoristo estas fonto de tekstoj, kiuj nepre devus esti konataj en Esperantujo.

A.- Anstataŭ traduki nacilingvajn kanzonojn, kial niaj gitaristoj ne ĉerpas el la ŝvarca minejo, kie la gajaj kaj spritaj aŭ eĉ mokaj poemoj abundas ?

Cl.- Ĉar ili simple nekonas la ekziston de tiuj humuraĵoj.

Aŭdu la poemeton **Zoologia scivolemo** :

Ni lernis, ke la struto
Per avidega gluto
Formanĝas ŝtonojn senhezite.
Sed restas la demando :
Ĉu pro malsat' aŭ frando ?
Kaj plue: ĉu profite?
Kaj – por konfesi ĉion –
Obsedas min deziro :
La fizionomion
De l' ŝtonoj vidi ĉe l' eliro !

A.- La tempo mankas al ni por legi la kanzonon **Tra la tuta jaro sur mia gitaro**, kanto, kiu finiĝas per la agrable ritmitaj versoj :

Cl.- Jen fino de l' kanto kaj fino de l' jar'.
Vi rajtas silenti, ho mia gitar'!

A.- Kaj la naivaĵoj **Pli bone** estus citendaj. Aŭdu konklude kelkajn el ili :

Pli bone estas kanti
Eĉ laŭ malĝusta ton'
Ol senrespekte... tusi
En mezo de salon'!

Cl.- Pli bone estas pinĉi
Knabinon en la krur'
Ol tikli episkopon
Ĉirkaŭe de l' tonsur' !

A.- Pli bone estas senti
Kiseton sur vizaĝ'

Literaturaj perloj, 3-a parto
Inter ternantoj de Raymond Schwartz
Claude Gacond, 245-a radioprelego, 1968.06.19 & 22

Ol senti aŭ ricevi
Piedon sur postaĵ' !

Cl.- Pli bone estas skribi
Insultojn per kraĵon'
Ol sendi komplimentojn
Per kuglo de kanon' !

A.- Pli bone estas diri
Stultaĵojn, kiel mi,
Ol ronki sur fotelo
De la akademi' !

Cl.- Pli bone estas fini
Ĉi kanton antaŭ fin'
Ol aŭdi la publikon
Kriegi :

A.- « Fermu ĝin ! »

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-